# Informilo

Monata revuo de F L A N D R A E S P E R A N T O - L I G O
Maandblad van V L A A M S E E S P E R A N T O - B O N D

Jarkolekto
Jaargang N° 1 okt. 1981

Verantwoordelijke
Respondecas Jan BOVENDEERD, Speeltuinlaan 14, B-2510 MORTSEL

---

13 OKT. 1981

S P E C I A L A N U M E R O

L.S.,

Bonvolu speciale atenti tiun ĉi numeron de INFORMILO ĉar ĝi pritraktas tre specialan kaj gravan aferon, rezulte de la administrantara kunsido de sabato 3-a de oktobro 1981, okaze de la D U A F E D E R A C I A E S P E R A N T O - K O N G R E S O de B E F.

Ĝia celo estas krei kiel eble plej klaran situacion kaj honestan sintenon por eviti ĉiun eblan miskomprenon kaj krei la necesan ligon inter estraro kaj la lokaj grupoj.

Anticipan dankon pro via komprenemo.

---

En ĝenerala kunsido de la grupaj reprezentantoj, okaze de la 2-a Federacia Esperanto-Kongreso de BEF, je sabato 3-a de oktobro 1981, decidiĝis deklari la jaron 1982 PROVA JARO por la FINANCA ADMINISTRADO de Flandra Esperanto-Ligo laŭ jena maniero: (Por pliaj detaloj, bonvole antendu la protokolon de la kunsido, kiu aperos en la venonta numero de INFORMILO).

Interne de ĉi bulteno vi trovos ekzempleron de ALIĜILO/MENDILO, kiun ricevos ĉiu membro de FEL kun la novembra numero de ESPERANTO PANORAMA, kun la peto plenigi ĝin kaj transdoni ĝin al la kasisto de la grupo al kiu li/ŝi volas aliĝi, pagante al tiu ĉi la totalan sumon indikitan sur la formularo.

Kompreneble, membro kiu preferas rekte aliĝi al FEL povas tion fari, sendante sian aliĝilon al ESPERANTO-CENTRO, Frankrijklei 140 2000 ANTWERPEN kaj pagante al FEL la totalon de la sumoj indikitaj.

Plie, personoj kiu jes volas aliĝi al iu grupo, sed havas malfacilaĵojn por kontakti la kasiston, ankaŭ povas sendi la aliĝilon kaj pagi al FEL, kiu poste havigos al la koncernata grupo la nomon de la tiel aginto.

La grupaj kasistoj estas petataj kolekti la formularojn kaj sendi ilin regule - sufiĉe rapide, ĉar UEA sendas sian revuon nur al abon-pagintoj - al FEL - ESPERANTO-CENTRO, Frankrijklei 140, 2000 ANTWERPEN kaj pagi la TOTALON de la ricevitaj (menciitaj) sumoj en la konton 402-7069801-50 de FEL.

Poste FEL-ESPERANTO-CENTRO sendos al la grupoj la liston de iliaj gemembroj, faras la necesajn kalkulojn kaj pagos al la diversaj grupoj la parton al ili destinitan el la kotizoj (50 %).
Grave estas do, ke la grupoj indiku sian kontonumeron.

FEL-ESPERANTO-CENTRO ankaŭ zorgos por la perado de la abonoj.

Kelkaj detaloj :

Vi rimarkos ke :

1. la kotizoj estas absolute UNUFORMAJ : BF 100,- por ĉiuj membrokategorioj, inkluzive de la simpatiantoj.



2. Individua membreco de UEA oni akiras per abono al la JARLIBRO kaj la revuo ESPERANTO, fakte pli malmultekoste ol per rekta aliĝo al UEA.

3. demandite estas indiki por ĉiu membro la naskiĝdaton. Tio ebligos al E°-Centro transigi al FLEJA la junulajn membrojn kaj kotizojn.
   Tio ĉi same ebligos decidi ekde kiu momento nia informbulteno ESPERANTO PANORAMA estu daŭre sendota al pliaĝaj membroj kiuj, pro ia kialo, ne povos atingi la grupajn kasistojn aŭ ne plu kapablas plenigi formularojn.
   Cetere, tiu ĉi-rilate sugestoj estas ege bonvenaj !

4. eblos esti membro sen aboni ia ajn revuon aŭ/kaj aboni revuon sen esti membro.

5. FEL peros la diversajn revuojn por tiel eviti al la membraro memorteni pliajn adresojn.

   En tiu ĉi sistemo estonte oni memoru nur unu nuran adreson por ĉio, kio koncernas Esperanton, nome

   E S P E R A N T O - C E N T R O
   F r a n k r i j k l e i   1 4 0
   2 0 0 0   A N T W E R P E N

6. la grupaj kasistoj ne plu devas fari kalkulojn, krom totaligajn, sed jes zorgi pri rapida alsendo de la formularoj, ĉar ja, kiel jam dirite, UEA sendas la revuon ESPERANTO nur post la pago de la abonsumo.

7. Tiuj, kiuj volas de proksime sekvi la movadajn aktivecojn en Flandrujo kaj partopreni en la diskutojn kaj la decidojn, povas tion abonante INFORMILO-n de FEL.

La respondeculoj de FEL esperas tiamaniere kaj plisimpligi la administran laboron de ĉiuj kunlaborantoj, kaj rezervi pli bonajn servojn al la membraro kaj fin-fine akiri situacion en kiu ĉiu ajn povos facile trovi sian vojon kaj profiti kiel eble plej multe el la ĝenerala movado.

Ĉu, ankaŭ nun, ni povos kalkuli je ĉies kompreno kaj kunlaboro por ke fine nia organizo estu tiel bone administrata ke siaj problemoj estu facile kaj rapide solveblaj.

FLANDRA ESPERANTO-LIGO
Frankrijklei 140
2000 ANTWERPEN

VLAAMSE ESPERANTOBOND
Frankrijklei 140
2000 ANTWERPEN

ALIĜILO / ABONILO AANSLUITINGS-/ABONNEMENTSFORMULIER

13 OKT. 1981

Preferata grupo / Geprefereerde groep : _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _

I. (Ĉef)-membro - Hoofdlid : Nomo/naam : _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _

Naskiĝdato / Geboortedatum : _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _

Adreso/adres _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _

_ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _

II. Membroj kunloĝantaj kun I. / Bij I. inwonende leden

| Nomoj/Namen | Naskiĝdatoj/Geboortedata |
|---|---|
| _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ | _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ |
| _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ | _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ |
| _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ | _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ |
| _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ | _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ |
| _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ | _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ |
| _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ | _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ |

III. Kotizoj / Bijdragen

| | | | |
|---|---|---|---|
| 1. Membro/Lid (1) | _ _ _ _ _ | X 100 = | _ _ _ _ _ |
| 2. Subtenkotizo al FEL / Steunbijdrage aan VEB (1.a) | _ _ _ _ _ | X 500 = | _ _ _ _ _ |
| 3. Subtenkotizo al FLEJA / Steunbijdrage aan Vl. Esperantojeugd (1.b) | _ _ _ _ _ | X 500 = | _ _ _ _ _ |

IV. DONACO ( minimume 1000 F. estas subtrahebla de la impostoj)
GESCHENK (minimum 1000 F. is aftrekbaar van de belasting) _ _ _ _ _ _ _ _ _ _

V. ABONOJ / ABONNEMENTEN :

| | | | |
|---|---|---|---|
| 1. ESPERANTO PANORAMA (Nederl.) | _ _ _ _ _ | X 100 = | _ _ _ _ _ |
| 2. INFORMILO (FEL) Esperanto. | _ _ _ _ _ | X 100 = | _ _ _ _ _ |
| 3. ESPERANTO (UEA) | _ _ _ _ _ | X 350 = | _ _ _ _ _ |
| 4. KONTAKTO (TEJO) | _ _ _ _ _ | X 270 = | _ _ _ _ _ |
| 5. JARLIBRO (UEA) (3) | _ _ _ _ _ | X 380 = | _ _ _ _ _ |
| 6. HEROLDO DE ESPERANTO | _ _ _ _ _ | X 490 = | _ _ _ _ _ |
| 7. MONATO | _ _ _ _ _ | X 960 = | _ _ _ _ _ |
| 8. _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ | _ _ _ _ _ | X _ _ = | _ _ _ _ _ |
| 9. _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ | _ _ _ _ _ | X _ _ = | _ _ _ _ _ |
| 10. _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ | _ _ _ _ _ | X _ _ = | _ _ _ _ _ |
| | Totalo | | _ _ _ _ _ |

Tiun totalon mi pagos : 0 * en la kontnumeron 402-7069801-50 de FLANDRA ESPERANTO-LIGO
Dat totaal stort ik : 0 * op rekeningnummer 402-7069801-50 van VLAAMSE ESPERANTOBOND
0 * kontante al / kontant aan _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _

* indiku per ☒ la elektitan pagmanieron / vermeld met ☒ de verkozen betalingswijze.

---

(1) Membreco enkluzivas por :
Lidmaatschap impliceert voor :
a) + 26 {jaruloj / jarigen : ESPERANTO PANORAMA
b) - 26 {jaruloj / jarigen : JEN + KONCIZE
c) - 18 {jaruloj / jarigen : {2-jara abono al / 2-jaarl. abonnement op JEN + KONCIZE

(2) DONACO de minimume 1000 F. rajtigas abonon al
GESCHENK van minstens 1000 F. geeft recht op ESPERANTO ( UEA ) kaj/en JARLIBRO ( UEA )

(3) Abono al JARLIBRO implicas INDIVIDUAN MEMBRECON de UEA.
Anbonnement op JARLIBRO impliceert INDIVIDUEEL LIDMAATSCHAP van UEA.

Se restas demandoj, nepre ne hezitu informpeti, ĉu skribe al la ESPERANTO-CENTRO, ĉu telefone (provizore) ĉe la sekretario, prefere vespere post la 19-a horo, je 031/49 50 06.

FEL-estraro elkore dankas pro via ŝatata kunlaboro kaj promesas fari sian eblon por kontentigi ĉiu laŭ-eble.

JB

ooooo O ooooo